

Jarraporto de la TEJO-estraro, -stabo kaj -komisiitoj

2016



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Nieuwe Binnenweg 176

3015 BJ Rotterdam

Nederlando

www.tejo.org

Kompilita de Arina Osipova
Moskvo, la 5-a de aprilo 2017

Enhavo

Enhavo

Enkonduko

Administrado

Financoj

Adoleska agado

Aktivula trejnado

Edukado

ILEI-Konferenco

Eksteraj rilatoj

Homaj rimedoj

Informado

Informiloj

Kontakto

Nova servilo

TEJO-aktuale

Kulturo

Kongresoj

IJK 2016

IJK 2017

Landa agado

Merkatiko

Pasporta Servo

Scienca kaj faka agado

Oficistoj

Mounir Abjiou

Uriel Gurián

Volontuloj

Jeremie Bert

Michal Matúšov (KuboF)

Ana Stretcu

Alessandro Bonfanti

Mallongigoj

Suplementoj

Suplemento 1

Suplemento 2

Enkonduko

raportas Michael Boris Mandirola, prezidanto

Ĉi tiu jarraporto aperas en nekutima ritmo konsekvence al la ŝanĝo en la estrara reglamento aprobita pasintan decembron laŭ kiu la jarraporto ne plu temos pri la kongresa jaro sed pri la suna jaro. Tial ĉi tiu raporto prias la tutan jaron 2016 kaj signifan parton de ĝia enhavo estis jam en la antaŭa jarraporto pri la kongresa jaro 2015-16.

Okazis ŝanĝo en la Estraro pro la demisio de Ariadna García Gutiérrez en aŭgusto kiu kondukis al la elekto en septembro de Enric Baltasar kiel nova estrarano de TEJO. Tio ankaŭ portis al ioma rearanĝo de la respondecoj ene de la Estraro kaj al aparta aktiveco kadre de Landa Agado sub la gvido de nova estrarano.

2016 povas esti konsiderata turnopunkto en la historio de TEJO, kaj ni povas ekzemple mencii:

- La aprobo de nova Statuto kaj statuso kadre de UEA.
- La altigo de la aĝlimo al 35.
- La ricevo de rekorde multe da subvencioj kadre de Erasmus+, interalie de tiu kiu ebligas financeblan IJKn en Afriko.
- La kresko de la stabo kiu en septembro atingis pinton je 8 oficistoj, 4 volontuloj kaj 2 redaktoroj.

Restas tamen problema situacio rilate al la Strategia Plano kaj ĝia plenumo kiu plejparte ne efektiviĝis. Tio estu nepre atentata en 2017, lasta jaro de la Strategia Plano, kaj aparte konsiderata en la procezo je difino de la nova Strategio por la postaj jaroj.

Evidente ne ĉio okazas senprobleme kaj aperas novaj mastrumaj kaj administraj defioj lige al la kresko de la subvenciitaj projektoj kaj la stabo kun fojaj subitaj traktendaĵoj. Tamen la struktura kresko mem helpas kaj ebligas la trakton de tiuj kromaj defioj kaj ni optimisme povas prognozi pluan kaj diversan kreskon de TEJO.

Administrado

raportas Arina Osipova, ĝenerala sekretario

La jaro 2016 estis aparte grava rilate al la strukturo de TEJO. La Komitato en julio aprobis novan Statuton de TEJO, Regularon pri Kunlaboro inter UEA kaj TEJO, Ĝeneralan Reglamenton kaj Reglamenton pri la Internacia Junulara Kongreso. La Statuton kaj la Regularon pri Kunlaboro aprobis la postan semajnon dum la Universala Kongreso la Komitato de UEA kadre de nova Regularo pri TEJO. Fine de la jaro okazis kroma fajnigo de diversaj reglamentoj.

Tiuj dokumentoj markas gravajn progresojn en la strukturo de nia organizo. Interalie kreiĝis nova, pli taŭga, kadro por la rilatoj TEJO-UEA, altiĝis la aĝlimo de TEJO de 29 al 35, enkondukiĝis nova senpaga membrokategorio “Junaj Amikoj de Esperanto” kaj oficialiĝis la reta voĉdono. Ni tamen daŭre atendas flanke de UEA la plenumo de la Regularo pri Kunlaboro, aparte pri rekta aliro al la kontoj de TEJO kaj al la membra datumbazo.

En la jaro 2016 komenciĝas nova oficperiodo de la Komitato kiu daŭros de junio 2016 ĝis la fino de majo 2018. La nuna Komitato konsistas el 39 personoj: 30 komitatanoj A (28 nomumitaj de landaj sekcioj kaj 2 de fakaj sekcioj), 1 komitatano B (elektitaj de la individuaj membroj), 3 komitatanoj Ĉ (elektita de la komitatanoj A kaj B) kaj 5 estraranoj.

Indas rimarki pri la ŝanĝoj, kiuj okazis en la Komitato dum la jaro. Tiel komence de la oficperiodo TEJO havis 2 komitatanojn B, unu el kiuj poste iĝis nova Estrarano de TEJO. La 11-an de aŭgusto 2016 de la estraranino pri LA kaj SFA Ariadna García Gutiérrez venis demisia letero (vidu Suplementon 1). La Komitato elektis novan estraronon Enric Baltasar, tiama komitatano B (la voĉdonon partoprenis 18 personoj, el kiuj 16 estis por).

Laŭ la Komitata reglamento ĉiu komitatano devas membri en almenaŭ unu komisiono de TEJO. Fine de 2016 aperis nova Komisiono pri egaleco kun la komisiito Paulina Kozuchova (respondeca estrarano Juliana Evandro) Nun TEJO havas 11 komisionojn:

- Komisiono pri Adoleska Agado
- Komisiono pri Aktivula Trejnado
- Komisiono pri Edukado

- Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
- Komisiono pri Homaj Rimedoj
- Komisiono pri Merkatiko (la antaŭa nomo estis Komisiono pri Informado, la nomo estis ŝanĝita dum la Estrara kunsido en Nitro)
- Komisiono pri Kulturo
- Komisiono pri Landa Agado
- Komisiono pri Moviĝebloj
- Komisiono pri Pasporta Servo
- Komisiono pri Scienca kaj Faka Agado

En decembro 2015 sian volontuladon finas Paweł Fischer-Kotowski (Pollando). Ekde tiu tempo kiel volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo kiel TEJO-volontulo deĵoris Jérémie Bert (Francio) kaj januare 2016 alvenis dua volontulo Michal Matúšov (KuboF), Slovakio. Ambaŭ volontuloj venis kadre de EVS-programo kaj plenumis la taskojn ĝis januaro 2017. Septembre al la CO venis du novaj volontuloj - Alessandro Bonfanti (Italio) kaj Ana Stretcu (Rumanio). Ana ne estas esperantisto kaj lernas Esperanton dum sia volontulado. Estas unua (gravas ke pozitiva) sperto por TEJO, kiam venas neesperantista volontulo. Kune kun la volontuloj multan laboron ekde komenco de la jaro plenumis du oficistoj – en oktobro 2015 por tiu posteno estis elektita Mounir Abijou (Maroko) kaj en januaro 2016 Uriel Gurdián (Nikaragvo), kiu laboras duontempe. En oktobro Uriel demisiis (vidu Suplementon 2).

Cetere en aŭgusto ni havis konfirmon ke EACEA ne akceptis subvencii la dungon de Uriel kaj Mounir pro tio ke ili loĝas ekster la landoj de Erasmus+, malgraŭ ke tiu regulo ne estis eksplicite skribita en la gvidlibro de la subvencipeto. TEJO decidis tamen investi je dungado de aliaj homoj kaj septembre al la Komitato estis prezentitaj novaj oficistoj de TEJO dungitaj kadre de la administra subvencio. La oficistoj laboris por la organizo ĝis fino de la jaro kaj havis diversajn taskojn:

- Komputilistoj:

Abel Johannes “Joop” Kiefte

Baptiste “Batist” Darthenay

- Grafikisto:

Przemysław “Przemek” Wierzbowski

- Merkatikistoj:

Besenyei Eszter “Stela”

Łukasz “LukiZ” Żebrowski

Peter “Petro” Baláž

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri siaj agadoj. Iliaj raportoj aperas en la formo de la monata cirkulero, dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj estas legeblaj ĉe la paĝaro de TEJO kaj en Trello.

Financoj

La raporto estas en aparta dokumento

Subvencioj

raportas Mounir Abjiou, oficisto

Dum la jaro 2016, TEJO havis du oficistojn kiuj korespondis pri subvencioj. Mounir Abjiou subvenciflanke ĉefe, sed ne nur, zorgis pri EVS-subvencipetoj. La raporto pri la unua EVS projekto de Paweł Fischer-Kotowski estis pozitiva kaj TEJO jam ricevis la finpagon de la projekto. Plie ni ricevis sukcesajn subvenciojn tra EVS por la jenaj volontuloj: Ana Stretcu (ekde septembro 2016), Alessandro Bonfanti (ekde septembro 2016) kaj Fériel Djénidi (ekde februaro 2017). Uriel Gurdián, sukcese petis plilongigon de la akreditigo de EVS kiel riceva, kunordiga kaj senda organizo ĝis la jaro 2020, kiun ni jam povis alprofiti.

Rilate al la administra subvencio, ni ricevis pozitivan rezulton pri kunfinancado de unu plentempa oficista posteno kaj duono kaj kvar statutaj kunsidoj, el kiuj tri estraraj kaj unu komitata, tamen EACEA ne akceptis la dungadformon de Mounir kaj Uriel, kaj post la aŭgusta surloka kunsido en la Centra Oficejo kun EACEA, la Estraro dungis pli da oficistoj kiuj estas validaj por la administra subvencio. La raporto de la subvencio pri la 2015-a administra

subvencio estis finfine akceptita kaj ni ricevis la ceteran finpagon krom la kunfinancadon de la du monatoj de Mounir por la monatoj de novembro kaj decembro 2015. Mounir subvencipetis novembre 2016 la saman sumon por financi unu plentempan oficistan postenon kaj duonon aldone al kvar statutaj kunsidoj, ni daŭre atendas la baldaŭan rezulton por la jaro 2017.

ETEY estis raportita per Mounir, sed ni ne ricevis la rezulton ankoraŭ. Kosmo, sukcesigis al ni du subvenciojn dum la jaro 2016: Effective Communication for Youth (ECY, Efika Komunikado) kaj AEJK kiu estas tre grava por la organizado de IJK 2017.

Niaj malsukcesoj estis administra subvencipeto tra la Eŭropa Junulara Fonduso, kaj alia subvencipeto de DEAR Call al EuropAid kiun WOSM pretigis kun TEJO, UEA kaj aliaj organizoj. Pri tiuj prizorgis Mounir, kaj Uriel paralele provis tra Erasmus+ subvencipeton pri Kapablokonstruado Eŭropo-Ameriko, sed sensukcese. Aldone, kvankam niaj ŝancoj ne estis tiom grandaj, Ana Ribeiro ankaŭ subvencipetis tra la Mozilla-fondaĵo sensukcese.

Aktivula trejnado

raportas Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano

Komence de la jaro Alejandro Escobedo Muñoz, tiama komisiito iom deflankiĝis de la agado pri AT.

La fokuso de TEJO en aktivula trejnado estis pri la projekto ETEY, junulara Erasmus+strategipartnerado celanta krei trejnistojn. La trejnadprogramon gvidis trejnistoj el BEST (*Board of European Students of Technology*) kiu estas unu el la junularaj organizoj kun plej granda trejnosperto en Eŭropo.

17 TEJO-anoj partoprenis intensegan seminarion en marto dum la Internacia Junulara Festivalo en Pesaro kaj el ili 15 plutrajniĝis en Vroclavo dum la IJK estigante la unuan generacion da TEJO-trejnistoj. La unua liverado dum la IJK konsistis el trejnsesioj pri Grupa Dinamiko (Spencer van der Meulen kaj Karolina Rzeszuto), Gvidado (Roĉjo Huurman), Komunikado (Magnus Henoch kaj Natalia Żebrowska), Motivado (Anna Albert Torres kaj Karina Maĵosa), Persvadado (Agata Cichocka kaj Eloy Guerra Olivar), Presentaj Kapabloj (Vicente Fauli kaj Joop Kieft), Projekmastrumado (Juliana Evandro kaj Sasha Murr) kaj Strategia Planado (Enric Baltasar kaj Michael Boris Mandirola).

En oktobro en Kotonuo, kadre de Afrik-Eŭropa Junulara Kapablago antaŭ la oficiala komenca evento okazis trejnado pri organizado de eventoj fare de Karina Maĝosa kaj Natalia Żebrowska. Ĝin partoprenis interalie kelkaj organizontoj de la 73a IJK.

Estis krome kreitaj de nia oficisto Uriel Gurdián, la novaj retaj trejnadoj pri merkato kaj organizado de eventoj kiuj atendas finpoluron por esti oficiale lanĉitaj. Krome la rettrejnado TEJO-KER estis abunde uzita por prepari la aktivulojn kiujn partoprenis Eŭropan Junularan Okazaĵon en Strasburgo kaj la novajn TEJO-volontulojn. 21 homoj finis la enkondukan kaj 1 homo finis la spertiĝantan.

La komisiono pri Aktivula Trejnado dormetis pro manko de taŭga komisiito sed la okazigo de la trejnadprogramo ETEY metis firman bazon por ke estontece ni havu ege pli abunde da trejnadoj liveritaj rekte en Esperanto. Mi certas laŭ la gvido de nova komisiito nia agado prosperos en la fako.

Edukado

raportas Arina Osipova, respondeca estrarano

Bedaŭrinde dum la jaro la komisiono apenaŭ funkciis. Tio okazis pro du kialoj, ĉar la respondeca estrarano fizike ne havas tempon por la komisiono pro aliaj TEJO-farendaĵoj. Kaj samtempe la komisiono ne havas komisiiton, kiu pretus aktivigi kaj gvidi la laboron. La malaktivado de la komisiono efikas al la atendotaj rezultoj priskribitaj en la Strategia plano por la jaroj 2014-2017 (Agadkampo 2: Kapablago, p. 2.1.). Apenaŭ estis faritaj multe da paŝoj por kunlabro de junaj insturistoj kaj okazigo de intensaj E-kursoj.

TEJO plue premias siajn individuajn membrojn, kiuj trapasas la ekzamenon je nivelo C1 laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Ĉiuj premiitoj sukcese trapasis la ekzamenon.

ILEI-Konferenco

Por la 6a - 8a de aŭgusto okazis vojaĝo de la nuna TEJO-volontulo Michal Matúšov (KuboF) al la 49-a ILEI-Konferenco en Nyíregyháza (Hungario) cele plibonigi rilatojn kun ILEI kaj preparoli la ontajn kunlaborajn planojn. Dum la konferenco kun la ILEI-Estrarano estis preparolitaj jenaj temoj:

- Intruista trejnado, kunorganizita de ILEI kaj de TEJO (io simila al la "Flugiloj de malfacila vento").
- Fonduso "Partoprenu ILEI-Konferencon" por plispertigi junajn instruistojn kaj junigi partoprenantaron de la evento.
- Kunlaboro kun gejunuloj por prepari la programon de ILEI-Konferenco kaj aparte zorgi pri la Junulara programo por pli allogi gejunulojn partopreni la konferencon.

Dum la Konferenco okazis prelego "TEJO sinprezentas (ne nur) eduke", kie klasikia prezentado estis miksitaj kun edukado kaj laborkampo de ILEI. La prelegon partoprenis ĉ. 25 personoj, iuj specife anticipe demandis pri ĝi kaj volis partopreni (ekz. Duncan, la profesoro de Usono). Krome KuboF kontribuis por la programo per sia prelego "(Mal)libereco de edukado" pri kopirajtaj konsekvencoj por edukaj materialoj.

Eksteraj rilatoj

raportas Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano

Kadre de eksteraj rilatoj, TEJO aktivis ĉefe en FoJE (Forumo Junulara Eŭropa), tra kiu ĝi elektiĝis en la Konsilkonsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo, IKRJO (Internacia KunordigRenkontiĝo de Junularaj Organizoj) kaj UNITED (Unuiĝintaj por Interkultura Agado) pri kiuj estos apartaj ĉapitroj sub la gvido de la koncerna komisiito.

En majo, post EJO, okazis strategia kunsido de TEJO-KER gvidita de Veronika Poór, Ĝenerala Direktoro kaj sperta KER-aktivulo. Estis ellaboritaj specifaj strategioj pri FoJE, IKRJO, Unesko kaj UNITED en laborgrupoj.

Menciindas krome la kontakto kun la kreiĝanta projekto Pangee200 (origine "G200") por kiu oni proponis al TEJO esti fonda partnero kaj Klára Ertl partoprenis la unuan fondkunsidon en septembro en Parizo.

La komisiono profitis je la kunlaboro dum la unua duono de la jaro de la oficistoj Mounir Abijou kaj Uriel Gurdián, dum fine de la jaro nia TEJO-volontulo Ana Stretcu taskiĝis pri prioritato pri TEJO-KER.

Cetere pro la kreskanta komplekso kaj amplekso de la agado de la komisiono kreiĝis neformala kunordiganta grupo kun la respondeca estrarano, la ĝenerala direktoro, la komisiitoj kaj la TEJO-KER-volontulo.

TEJO-KER estas tre aktiva komisiono kun pluraj spertaj homoj kiu garantias kontinuecon kaj kompetenton kune kun diversaj gejunuloj kiuj iom post iom fariĝas pli aktivaj kaj prenas kernan rolon en la komisiono.

La agado estas vigla kaj je tutmonda kaj je eŭropa nivelo; malpli fortas la agado je kontinenta nivelo ekster Eŭropo, malgraŭ ia strebo en Ameriko, sed dirindas ke la socipolitikaj kondiĉoj estas multe pli favoraj en Eŭropo ol en aliaj kontinentoj.

La reputacio de TEJO signife pliboniĝis laŭ la jaroj kaj ni estas ĉiam pli aktiva kaj konata organizo. Tio postulas multe da homaj kaj financaj rimedoj por ke TEJO povu almenaŭ gardi ĉi tiun nivelon da aktiveco - aliflanke tiu mono iasence revenas, ja nia laboro en Forumo Junulara Eŭropa kaj IKRJO estis menciitaj kiel argumentoj por aljuĝo de la administra subvencio en 2016.

Forumo Junulara Eŭropa

raportas Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano

Kadre de Forumo Junulara Eŭropa la agado daŭras kaj intensas.

TEJO estas parto de la reto de *Interŝanĝaj organizoj*, nome internaciaj organizoj sen partia aŭ religia orientiĝo. Tiu aparteno donas aliron al pli da maloficialaj informoj kaj komprenoj, aliflanke ni sentas ioman malsintonion kun kelkaj aliaj organizoj, kvazaŭ integrumas la grupon malpli ol aliaj organizoj.

Prievente, aprile la Membrokonsilion de FoJE en Bruselo partoprenis mi kaj Oleksandra “Saŝa Murr” Kovjazina.

Costanza “Tuŝka” Schönfeld ĉefrespondecis flanke de TEJO pri la YoFest! (ankaŭ konata kiel EJO, Eŭropa Junulara Okazaĵo) en Strasburgo de la 19-a ĝis la 21-a de majo kie kunvenis pli ol 7000 eŭropaj gejunuloj - ĝin organizis Forumo Junulara Eŭropa kaj TEJO estis oficiala partnero. Nia organizo partoprenis per 33 membroj (plus aliaj 8 novaj junaj esperantistoj el Trento de la grupo de Walter Bruno) kaj okazigis bazan kurson de Esperanto kaj lingvopolitikan ludon.

TEJO estis akceptita kiel partnero por ka YoFest! 2017 okazonta en Matriĥto; Ana Stretcu estas la TEJO-respondeculo kaj partoprenis la ekkunsidon.

TEJO ankaŭ aktive partoprenas la konsultadojn rilate al la laborplano fe FoJE, Saŝa Murr partoprenis konsultotagon pri FoJE-laborplanon en Bruselo kaj TEJO sendis sian kontribuon.

Perspektive al la estrara baloto en FoJE kreiĝis reto por malfermaj kaj demokratiaj elektoj; tiu reto organizis semajnfinan eventon kie TEJO-n reprezentis Léon Schnelldorfer.

Léon, mi kaj Veronika reprezentis TEJO-n novembre en la Ĝenerala Asembleo de FoJE okazinta en Varno dum kiu estis elektita la nova Estraro de FoJE.

Krome mi membris en la Konsultorgano pri membrecaj aferoj kaj tiukadre mi partoprenis kunsidon en Bruselo kaj mi studvizitis la Nacian Junularan Konsilion de Ukrainujo, provizante pozitivan rekomendon kiel observanto. Dum la Ĝenerala Asembleo mi estis nomumita por kroma du-jara mandato. Ĉi tiu posteno donas al mi, multe pli bonan travidon pri FoJE kaj aparte pri la aplikado de la membrokriterioj; krome ĝi permesas al mi havi pli da kontakto kun aliaj organizoj kaj ekscii pli pri ilia interna funkcmankiero ĉerpante bonajn ideojn por TEJO.

Konsilio de Eŭropo

raportas Oleksandra "Sasha Murr" Kovyazina, komisiito kaj membro de la Konsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo (AC)

En januaro, je la komenco de la mandato, mi transprenis de Veronika Poór (kiu rezignis pro gravaj personaj kaj profesiaj sindevigoj) la lokon en la Konsila Konsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo kie TEJO estis elektita pasintjare kiel parto de la reprezentantoj de Forumo Junulara Eŭropa. La mandato daŭras du jarojn, dum kiu mi havas plurajn respondecojn.

En la komisiono estas 30 homoj, 20 kiuj estas el FoJE reto kaj 10 el KdE reto. Mi estas en la Ĉapitro de inkluzivaj socioj kiu estas kerna idealo de Esperanto movado.

Ene de AC oni havas plurajn kampojn pri kiu respondecas nur specifa persono. Jen kelkaj respondecoj kiun mi havas:

Mi havas respondecon pri kampanjo de Konsilio de Eŭropo (No Hate Speech Movement), efektive la kampanio kontraŭ malamparolo kiu en si mem havas plurajn sekciojn. Mia respondeco kadre de AC estas membro de

Evoluigrupo de la Kampanio, ni provas havi superrigardon pri ĉiuj aktivaĵoj kiuj okazas/okazos. Ni faris decidojn pri prioritattagoj kaj temoj pri kiu fokusiĝu la kampanio, ankaŭ ni estos tiuj kiuj evoluigos kian utilon portis la Kampanio kaj kiel lasi ian heredaĵon de ĝi kiam ĝi finiĝos en fino de 2017. Kadre de tiu respondeco mi havis 2 vojaĝojn al Strasburgo kaj unu al Albanio, ankaŭ mi havas iom da kontakto kun britaj aktivistoj de la kampanio. Efektive en tiu ĉi evoluigrupo mi havas apartan fokuson pri seksisma malamparolo kaj InteretRegistaro (angle: Internet Governence) .

La dua respondeco estas parto de la laborgrupo pri Eŭro-Araba Junulara Forumo, kiu ĉi jare okazos en Maroko, en urbo Fez. Tio estas la junulara renkontiĝo en kiu kunlaboras Konsililo de Eŭropo (Junulara Departamento), FoJE kaj Ligo de Arabaj landoj. En tiu renkontiĝo la temo estas pri kontraŭbatalo de intermalamo.

Mia agado ĝis nun konsistis el tio ke mi partoprenis preparrenkontiĝon kun reprezentantoj de KdE, AL kaj Maroko (ĝia ministro pri junularo) krom FoJE (kiu fiaskis sendi sian reprezentanton). Ni kune ellaboris la strategion kaj la vizion de la “ideala partoprenanto” kaj tiel plu.

Programkomitato

Programkomitato estas komisiono kiu kune kun la sekretario de EJJ faras finan decidon pri monpetoj kiuj junularaj organizoj sendas al la fonduso.

Mi estas nur rezerva persono, tiu signifas, ke mi scias kio okazas sed ne ĉiam havas la decidpovon. Mi nur 2 foje vojaĝis por la renkontiĝo, sed nur unufoje mi havis decidpovon ĉar mi anstataŭigis iun personon kaj tiam devis intertrakti dekojn de monpetojn (aŭ centojn).

Komunikteamo

Mi estas en la grupo kiu estis neformale kreita por trovi solvon por “ne sufiĉa videbleco” de AC. Ni havis tre malmulte da kunvenoj, provas trovi solvon por havi decan retejon kaj bonfunkiantajn sociajn mediojn. Ekde la lasta kunveno (kiu okazis la 25-an de januaro) mia respondeco estas superrigardi fluon de tviterkonton kaj kompreneble alia aferoj.

EPLM tio ne vere estas mia respondeco, sed mi vojaĝis al ĝia renkontiĝo ĉar neniu el AC-respondeculoj povis veni, tiel mi nun havas plurajn taskojn al tio. EPLM signifas European Platform for Learning Mobility, ĝi estas partnerprojekto

inter KdE aj EU, ĝi ankaŭ estas la renkontiĝo kias celo estas la dialogo de la valoro de Lernigvojaĝoj.

Dum tiu ĉi renkontiĝo dum kiu ĉeestis reprezentantoj de kelkaj NA, EuroDesk, Trejnistoj kaj Esploristoj ni planis la renkontiĝon de EPLM kiu okazos en Francio fine de 2017. Krome ni prilaboris iom la Gvidlinian dokumenton pri kvalito de LernigMoviĝoj, kie nun mi estas en la grupo por redakti la enkodukpaĝon (ĝi prokrastiĝis pro la decembra-januaraj ferioj).

UNITED kaj Unesko

raportas Klára Ertl, komisiito

En aprilo Costanza “Tuŝka” Schönfeld partoprenis jaran konferencon de UNITED apud Torino kun ĉeftemo Rifuĝintoj. Dum la strategia kunsido de TEJO-KER en majo, menciita supre, mi estis nomumita kiel komisiito pri UNITED kaj Unesko. Dumsomere UNITED organizis retan kampanjon kontraŭ prikulpigado de enmigrintoj, kiun TEJO helpis disvastigi. En oktobro mi partoprenis jaran konferencon de UNITED apud Struga, Makedonio, kun ĉeftemo Repaciĝo. Fine de la jaro UNITED faris kampanjon pri “herooj de homaj rajtoj”, okaze de la Tago kontraŭ faŝismo kaj Tago de homaj rajtoj, al kiu TEJO kontribuis invitante Esperantistojn sendi tekston pri propra heroo.

Saŝa Murr partoprenis la Konferencon de NROj de Unesko kadre de UEA.

UN kaj IKRJO

raportas Francesco Maurelli, komisiito

Tutmonde la agado en IKRJO restas engaĝa por TEJO; ni transprenis la taskon je kontaktado de la aliaj membraj organizoj kaj en junio Michael Boris kaj mi partoprenis en Bruselo kunsidon de la kerna laborgrupo de IKRJO kie ni antaŭvidas kreskantan kerniĝantan rolon por TEJO.

Danke al nia agado en IKRJO, ni donis la ŝancon al Lucas Barbosa (Brazilo) partopreni la projekton “Junulara ŝanco - Manĝaĵo por la estonteco”.

En novembro okazis la ĝenerala kunsido de IKRJO, lige al COP22, en Marrakesh, Maroko. Mi partoprenis nome de TEJO en la laboroj. TEJO estis relelektita en ĝia plenumorgano, kaj ekhavas gvidan rolon en ĝi. Unuaj paŝoj estis la kontakto kun la Prezidanto de EKOSOK, kaj la laboroj cele al la Junulara Forumo en Novjorko, kiu okazos en januaro 2017.

Homaj rimedoj

raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano

La komisiono pri Homaj Rimedoj estas sen komisiito, tialmanke mi okupiĝas pri ĝi. Krom ĝeneralaj interrilatadoj, mi bonvenigas oficistojn, volontulojn kaj komitatanojn al TEJO-teamo kaj zorgas ke ili bone komprenu la funkciadon de la organizo. Mi ankaŭ verkis demandaron pri la aĝlima plialtigo por UEA-membroj aĝaj inter 29 kaj 35 jaroj kaj pretigis ĝian analizon. La komisiono ankaŭ prizorgis la produktadon de novaj viztakartoj por reprezentantoj de TEJO dum EJO en Straburgo, okazinta en majo 2016. Dum la jaro 2016 TEJO starigis sian stadon dum IJF, IJK, UK, KPPS kaj JES, por ricevi aliĝojn, klarigi dubojn, disdoni materialojn (Kontakto, informiloj, kondomojn, ktp) kaj disvendi t-ĉemizojn. La prelego “TEJO-sinprezentas” estis prezentita dum la UK en Nitro, kie ni ankaŭ ricevis la patronojn de TEJO por prezenti al ili la organizon. En novembro kaj decembro mi kaj Enric Baltasar elektis afrikajn junulojn por ricevi monsubtenon al la Afrika Kongreso de Esperanto, okazinta en Tanzanio.

Informado

raportas Juliana Evandro, estrarano

La komisiono pri Informado malestiĝis en aŭgusto 2016. Ĝi estis kunfandita al la Merkatika komisiono, gvidita de la tiame ĵuselektita estrarano Enric Baltasar. Ĝis tiam, mi okupiĝis pri ĝi kaj raportas la rezultojn:

Informiloj

raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano

Danke al la laboro de pluraj aktivuloj, kiuj tradukis la reviziis la informilojn de TEJO, ni sukcesis ekhavi ĝin en 7 novaj lingvoj (arpitana, dana, ĉeĥa, kataluna, hispanaeŭropo, hispanaameriko, vjetnama kaj piemonta). Kelkaj jam estas enpaĝigitaj, sed mankas reviziiston por ili. Specialan dankon al Barbara Pieczarka, kiu enpaĝigis la informilojn kaj al Costanza Schönfeld, kiuj kunlaboris pri kunordigo de la tradukadoj. Ĉiuj informiloj haveblas ĉi tie: <http://tejo.org/informiloj/>

Kontakto

raportas Rogener Pavinski, redaktoro de Kontakto

En 2016 la redakta laboro de Kontakto fluis stabile. Aperis 5 numeroj kaj la 6-a aperis komence de 2017 kun monata malfruo. Por tiu lasta numero oni decidis ŝanĝi la nomon de la rubriko “TEJO-tutmonde” al “Movada Rubriko”. La ĉeftemoj traktitaj estis “Sano kaj Malsano” (2016.6); “Nacia Identeco” (2016.5); “Senperforta komunikado” (2016.4) “Kien iras la religioj?” (2016.3); “La kaŝita katasfrofo” (2016.2) kaj Literaturo (2016.1). Ni tenis la konstantajn rubrikojn (La Blaga Blogo, Tiel la Mondo, Kontaktek, Recenzoj) kaj ĉe Intervjuoj, la gastoj estis: Evildea (Richard Delamore); Jennifer Bondelid; Jean-Marc Leclercq (jOmO); Zhang Ping (Ĝoja); Gerrit Berveling kaj Amir Hadžiahmetović.

En la reto okazis kreskoj: nia retejo estas konstante aktualigata kaj kreskas la atingo de niaj profiloj en la reto (Facebook-ŝatoj: de 1132 (2015) al 1.551; Twitter-sekvantoj: de 1005 (2015) al 1383.

La 3-an fojon ni organizis la Muzikan Konkurson de Kontakto. Ĉi-jare partoprenis 14 konkursaĵoj el diversaj stiloj kaj el diversaj landoj, kiuj estis aŭskultataj pli ol 15 mil fojojn. Tamen ni havis problemojn rilate al la kalkulado de voĉoj kaj malfruoj.

Nova servilo*raportas Michal Matúšov (KuboF), volontulo*

En 2016 TEJO plene forlasis malnovan retan servilon kaj transiris al nova. La transiro estis motivita de teĥnikaj kialoj, ĉar la malnova servilo ne estis sufiĉe stabila, kio malbone influis disponeblon de la retejoj kaj retpoŝto de TEJO. Aldone, la nova servilo provizas infrastrukturon, kiu ebligas novan teĥnikan evoluon, ekz. facilan kreadon de retejoj en subdomajno de tejo.org. Per la nova servilo nuntempe funkcias la retejoj tejo.org, pasportaservo.org, retpoŝtoj de tiuj domajnoj kaj la voĉdona sistemo. La transiron prizorgis la oficisto Joop Kieft kaj la volontulo Michal Matúšov.

TEJO-aktuale*raportas Juliana Evandro, respondeca estrarano*

Sub la redaktorado de Jan Kouzek, reta informilo de TEJO aperas 2 semajneritme. Ekde majo 2016 ĝi estas abonebla pere de nova servo, MailChimp (kaj tio okazis danke al la ĉeesto de Joop en la Centra Oficejo por helpi en la sekura transigo de la abonadresaron al la nova servo). Pere de MailChimp estis

senditaj 8 numeroj de TEJO-Aktuale dum 2016. Ekde septembro, Peter Baláž aldoniĝis al la teamo. Nuntempe volontulo de TEJO okupiĝas pri la redaktorado kaj dissendado de TA.

Kulturo

raportas Adrián Alejandro, komisiito

2016

Daŭris la komunikado kun la IJK-LKK. UEA intencis ne plu okazigi la "Fondaĵo Grabowski" (kiu subtenas la Esperanto-kulturon per premioj kaj subvencioj, precipe por originala kaj traduka beletro, kaj per kuraĝigo al junaj verkistoj) pro "manko de intereso" pri ĝi. Do ni decidis defendi la fondaĵon por ke ĝi daŭre vivu, tamen ŝanĝante kelkajn regulojn por igi ĝin pli inkluziva por junaj interesiĝantoj. Ni ne ricevis pliajn novaĵojn pri tio ĉi. Vidu la regularon de la Fondaĵo Grabowski.

Kun Ariadna García Gutiérrez ni komencis paroli pri la "Projekto biblioteko-retejo", kiu celas plibonigi kaj pliampleksigi la nombron de bitlibroj, daŭrigante la retpaĝon bretaro.net. Ni daŭre laboros por tiu projekto.

Ni okazigis la 3-an Muzikan Konkurson de la revuo Kontakto, pri tio ĉefe okupiĝis Rogener Pavinski kaj Michal "KuboF" Matúšov. Okazis interŝanĝo de ideoj kaj proponoj pri la konkursa regularo. <http://kontakto.tejo.org/2016/06/vocdonu-por-la-3-muzika-konkurso-de.html>

Kongresoj

raportas Arina Osipova, respondeca estrarano

IJK 2016 en Pollando

La 72-a IJK okazis de la 16-a ĝis la 23-a de julio en Vroclavo (Pollando). La temo de ĉi-jara kongreso #AKTIVADO estis dediĉita al reta aktivado de neregistaraj organizoj. Pli da informo pri la kongreso: <http://ijk2016.tejo.org/eo>. La kongreson partoprenis 264 homoj.

La unuan fojon mi kunorganizas IJK-n kiel estrarano. Por mi tio estas sendube tre respondeca kaj malfacila tasko, dum kies realigado okazis kelkaj malperfektaĵoj pri la organizado. La teamo, kiu antaŭe kandidatiĝis por okazigi

IJK-n en Vroclavo pro diversaj kialoj signife malgrandiĝis. Por multaj gravaj roloj mankis organizantoj. Tamen indas rimarki, ke tiuj PEJanoj, kiuj ĝis nun strebas fari la kongreson sukcesa, faras grandan laboron kaj plenumas samtempe multajn taskojn.

Du junaj aktivuloj Haiyan Gong (Ĉinio) kaj Hector Tomas Diaz Rivera (Peruo) ricevis subvencion de TEJO, kiu kovris partoprenkotizon kaj parte ankaŭ vojaĝkostojn al la IJK. Haiyan Gong bedaŭrinde ne sukcesis ricevi vizon kaj pro tiu kialo ne venis al Vroclavo.

Kadre de la IJK okazis dua parto de ETEY-trejnado (la unua okazis dum IJF 2016 en Italio). Indas ankaŭ rimarki, ke al la IJK aliĝis granda grupo de italaj adoleskuloj (ĉ. 20 homoj), por kiuj la organizantoj proponas apartajn programerojn, kiuj povos enmovadigi la adoleskulojn. Espereble tio ankaŭ helpos aktivigi komisionon pri adoleska agado.

IJK 2017 en Afriko

IJK en Afriko estas unu el celoj, kiun la Estraro devas atingi realiginte la agadojn laŭ la aktuala Strategia Plano (Agadkampo 3: komunumo, p.3.1.3.). Endas rimarkigi, ke tiu parto de la Strategia plano bone realiĝas malgraŭ kelkaj prokrastoj de la limdatoj.

La Estraro ricevis kelkajn kandidatiĝojn por IJK en Afriko. Dum Estrara Kunsido marte 2016 en Italio estis elektita plej taŭga kandidato por IJK 2017 - Burundo. La burundanoj plej respondece kaj serioze plenigis la formularon kaj certigis la Estraron pri sia preto kunlabori kaj organizi la Kongreson.

Kadre de la programo Erasmus+ estis pretigita subvencipeto por strategia partnerado en la kampo de junularo kun eŭropaj kaj afrikaj organizoj sub kunordigo de TEJO. Ĝi estis konceptita ankoraŭ de la antaŭa Estraro kaj estis verkata por limdato en aprilo 2015, sed tiam ne sufiĉis tempo por ke ĝi estu finprilaborita en prezentinda nivelo. La unua sendoprovo okazis en septembro 2015 kaj tiam la projekto estis malaprobata. Post la dua provo okazinta en februaro fine de majo 2016 la subvencipeto por Kapablokonstruado Inter Eŭropaj kaj Afrikaj landoj estis aprobita. Tio ebligas alporti al IJK 2017 kelkdekojn de gejunuloj el la partneraj landoj kaj vojaĝigi kelkajn aktivulojn por trejniĝi dum eventoj en Eŭropo kaj Afriko.

Aliflanke la nuna politika situacio en Burundo ne estas tute stabila, ĉar intertempe okazis prezidentaj elektoj, kio kreas enajn konfliktojn kaj malpermesas paroli pri plena sekureco en la lando. En iuj landoj ministerioj pri eksterlandaj aferoj malrekomendas memstarajn vizitojn en Burundo. La eŭropa agentejo respondeca pri nia subvencipeto konfirmis, ke en kazo de problemoj eblas alilokigi la burundan parton de la projekto, do konsekvence ankaŭ la IJK-n. Pro ĉio ĉi la Estraro decidis peti opinion de la Komitato kaj voĉdoni pri okazigo de IJK en Burundo. Bedaŭrinde ne estis atingita la kvorumo dum la voĉdonado kaj la decido revenis al la Estraro kiu esploris okazigon de la IJK en alia afrika lando.

Dum IJK en Vroclavo la TEJO-Estraro kunsidis kun Adjévi Adjé, kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA. Li proponis kongresi en Togolando al TEJO kaj al JOTE. Cetere en januaro JOTE jam esprimis sian fortan deziron al la Estraro organizi la kongreson, sed tiam ne finvenis la kandidatiĝo. Post la IJK, la Estraro denove komunikiĝis kun junaj togolandanoj kaj la reago estis entuziasma.

La 73-a IJK okazos de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2017. Por tiu IJK estis elektita urbo Aneho. La urbo situas en la sudorienta parto de Togolando 50 kilometrojn for de Lomeo kaj estas facile atingebla. La urbo estas proksime al Benino, kio plifaciligos kunlaboron inter JOTE kaj BOJE.

Landa Agado

raportas Enric Baltasar (estrarano)

Mi vidas Landan Agadon ne nur kiel komisionon, sed ankaŭ kiel fakon kiu teorie analizas kaj praktike kontribuas al nia movado. Kaj mi vidas du gravajn barojn: manko de sinkompreno kaj manko de (sama) direkto. Ni devas respondi demandojn kiel “Kion ni celu?”, “Kiun praktikan kontribuon ni faru?”, “Kial kaj kiel ni kunlaboru kun aliaj komisiitoj?”, “Kiujn problemojn ni solvu?”, “El kie ni prenu informojn”, “Kiel ni komprenu la funkciadon de la movado?” kaj “Kiel ni mezuru nian efikon?”.

Landa Agado havas kontinentajn komisionojn, sed ankaŭ mondan, kio utilas por ke -agnoskante niajn bezondiferencojn- ni kunlaboru por evoluigi la saman movadon kaj havi ĝeneralan trarigardon. Ne fari tion en la praktiko (diri ke oni kreis mondan komisionon ne signifas havi komisionon, nur vortojn surpapere) estus kontraŭcele, kvazaŭ en entrepreno iuj produktus parton de varo laŭ propraj

kriterioj kaj aliaj la alian parton laŭ ankaŭ propraj kriterioj, do fine la varo facile rezultus en io nevendebla pro malsamdirekteco.

La ĝeneralaj streboj dum ĉi pasintaj monatoj estis la atento pri homaj rimedoj, kreado de teamo (ne grupo de komisiitoj), difino de komunaj celoj kaj kanaloj, kaj ekstrukturigo de la komisiono. Iri de abstrakta al konkreta kompreno plus kunlaboro.

Ni kundecidis pri nia labormedio, ofte havis monatan kunsidon kun ĉiuj komisiitoj, analizis la datumojn kiujn ni bezonas por nia agado, organizan informfluan, reviziis la informojn kiujn ni havas pri la landaj sekcioj kaj kiel kontakti ilin, kreis historion de postenuloj, grupigis informojn (FLOM-analizo de la junulara movado, verkpetita artikolo pri oportunoj en kontinentoj...), kaj ni kreis la ĝermon de aferoj prezentitaj post la datofino de ĉi raporto.

Stela kaj mi dediĉis multajn horojn al la reformo de KODEJO kongrue al la bezonoj de la komisiitoj, kun kiuj ni diskutis pri ĝi, kaj al la reekoj de pluraj homoj. Krome la komisiitoj antaŭvarbis plenigontojn kaj kontaktos ilin. Pli da informoj komitatliste:

<https://groups.google.com/forum/#!topic/tejo-komitato/r1Rb7qdX57A>

Profitante mian sperton kiel komisiito pri Eŭropo, mi kreis iom da dokumentado pri taskoj kaj agadoj kiujn mi realigis, kiel interpreti la laborplanon de nia flanko, ekenkondukis ilin en median, taskan kaj tempan skemon, kaj ĝenerale trasscidonado suĉis multon el mia tempo. Sed ni ankoraŭ devas labori pri la starigo kaj komprenebligo de celoj kaj taskoj.

Io solvenda estis la sistemigo de LS-informoj, por kio ni kreis Centran Datumujon pri Landa Agado, kaj evidentiĝis ke ni bezonas pli necentran fonton kiu nutru ĝin per datumoj, kiu espereble estos KODEJO.

Mi kreis rilaton kun aktivuloj de AEGEE (plej granda organizo de universitataj studentoj), el kiuj dum monatoj mi lernis multon pri sia propra “Landa Agado”.

Ni ekdifinis novan rolon, “Landa Referencpunkto”, unuafoje publike preparolite en la propono pri statusigo de landaj sekcioj, kaj kiel enkonduki tiun rolon en la organizo.

Estis kreita modela formularo por eventopartoprenigaj konkursoj, de iuj jam uzita por la partoprenigo de junaj afrikanoj al AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) danke al donaco de Ans Bakker, pri kiuj Juliana kaj mi decidis.

Multaj pensas ke la mono de Fonduso Trampolino ne sufiĉas por plej multaj agadoj; mi faris proponon pri nova regularo kaj plialtigo de monsubtenoj kiu aprobiĝis, aperonta en la EsKu-raporto.

Mi kreis historion de aliĝpetoj de organizoj (dokumentoj, interŝanĝoj kaj konkludoj), verkis gvidliniojn pri statutlaborgrupoj por engaĝi komisiitojn kaj starigis laborgrupon por la enirigo de FEJ (Filipina Esperanto-Junularo) kiel nova landa sekcio.

Ni ankaŭ produktis la ĝermon de aferoj kiuj aperos en la sekva jarraporto, kiel raporto pri la cirkulero, merkatakaj laboroj, labormetodo por LA kaj aliaj.

Merkatiko

raportas Héctor Díaz (komisiito) kaj Enric Baltasar (estrarano)

Baza interna celo de la komisiono estis la integra funkcia transiro de Informado al Merkatiko, kio parte signifis ŝanĝon de direkto en la koncernaj prioritatoj, redistribuo de taskoj, konsidero de novaj variabloj, ekstarigo de mezuriloj, ktp. Ni daŭrigos ĉi-direkten.

De septembro TEJO dungis tri homojn kiuj formale rolis kiel merkatikistoj, kio montras la gravecon laŭ la organizo labori pri ĉi kampo. Ni opinias ke ni devus pli investi en neesperantistoj, sed ne estas dubo ke ili kontribuis al la merkatikigo de TEJO, kaj ni ĉefe volas danki la laboron de Stela.

Ni laboris pri la komunika politiko, en kiu nia plej granda sukceso estis la socireta koherigo kaj kongruigo, alivorte la strukturigo de nia socireta komunikado: uzi saman nomon, vidan identecon, planado de enhavoj, kompreni kie estas nia celgrupo kaj kie ni estu, simpligo de kanaloj, malsamigo de ĉiureta propono (formato, ofteco, enhavoj...), ktp.

Unu el la aferoj pri kiuj ni plej atentis estis la kompreno kaj komprenebligo de la organizo, ekzemple kion ni komunikas, kion oni ne komprenas pri ni, kiu zorgas pri kio, kial ni faras tion kion ni faras, ktp. Aparte prokrastis nian laboron la teknika flanko, ekzemple ke sukcesi havi aliron per FTP postulis tri monatojn.

Estis prezentita al UEA la projekto Retejigo (por havigi senpagajn profesiajn retejojn kaj konverti) kaj ni ricevis aprobon uzi esperanto.net. Dum monatoj ni aranĝis duopajn kunsidojn pri ĝi. Ni venis al la konkludo ke ni nepre bezonas buĝeton por ĝi, kiun UEA rifuzis komence doni, kaj ni fine kunsidis kun sia prezidanto. Ni venis al interkonsento kiu plilongigus kaj plikomplikigus la projekton, sed aldonus valoron al ĝi kaj danke al tio UEA provizus monon; krome ni sukcesis havi liberon por dungi memserĉotajn neesperantistojn kaj tiel trovi diversfakajn fakulojn kiujn ni bezonas. Poste ni ekserĉis homajn rimedojn, kaj ni esperas repreni la aferon februare. Dume TEJO jam havas propran instalon de WordPress Multisite kaj, kvankam restas finaj detaloj, ni jam povas proponi senpagan retspacon al niaj sekcioj, komisionoj k.a.

Por la engaĝo de membroj kaj komunumsentigo unu el niaj diversaj agadoj estis la analizado pri membrara forumo, ankaŭ lige al simpligo de kanaloj. Ni ankaŭ plispertiĝis pri aktivigo de forumoj, pli defia celo ol kiom ĝi povas ŝajni.

Ni kontribuis al la kontentigo de evidentaj necesoj kiuj estis longe nekontentigitaj, kiel la reklamado de eventoj de la landaj sekcioj kaj pli da grafikaj materialoj <http://tejo.org/fotaroj>.

Por la projekto pri Junaj Amikoj de Esperanto estis kunlaboro kun UEA, sed la projekto ne estas ankoraŭ matura niaopinie.

Cele al paĝar-restrukturigo ni interalie realigis realtempajn sesiojn kun pluraj esperantistoj kaj neesperantistoj, kreis planadon pri ŝanĝoj, ekuzis profesiajn statistikojn, ŝanĝis ordigojn iom post iom danke al datumoj kaj faris analizon pri la serĉila poziciigo.

Ilo kiu ĝuas grandan atenton flanke de komitatanoj kaj estraranoj estas la cirkulero, sed oni ne kontentas pri ĝi. Ni esploris kaj baldaŭ aperos raporto kun proponoj.

Ni kreis markan Youtube-kanalon kaj aktivigis la kanalon per pluraj videoj.

Estis komprenkonfuziĝo inter Kontakto, TEJO Tutmonde kaj TEJO Aktuale, krom malkontento de la redaktoro de TT kaj silenta demisio de tiu de TA. Ni ŝanĝis la nomon de TEJO Tutmonde per Movada Rubriko; kreis enketon por TA por kompreni nian publikon kaj ŝanĝis la aperig-oftecon al unu fojo monate; ekkreis enketon por Kontakto-MR; plibonigis enhave kaj aspekte TA; ktp.

Ĉar ni vidis grandan bezonon pri Homaj Rimedoj sed malmulte da iniciatemo el tiu komisiono, ni ekprenis parton el la praktika respondeco, ekzemple pri oficist-raportado, *elir*-enketoj, ktp. Unu el niaj streboj estis ke gravaj aferoj ne estu aŭtomate urĝaj por havigi pli da pli da kontentiĝo kaj pli da sukceso. Krome ni sistemigis kaj kreis ilojn por ŝparigi tempon.

Post publikigo de la hispanlingva Duolingo-kurso ni kreis proponaron pri kiel stimuli aliĝadon, ekmezurigas organizan kontribuon pri kursfinintoj kaj ektrasendis informojn pri enkomunumigeblaj lernantoj al landaj sekcioj.

Ni eklaboris kun Homaj Rimedoj kaj Financoj, kaj deziras plu kaj pli labori kun ili, ekzemple por la starigo de financaj mezuriloj kaj komprenebligo de la repagpolitiko.

Nin zorgigas la malmulta engaĝiĝo en TEJO kaj esploras kaj faras provojn pri ĝi, ekzemple ni kreis paĝon en konstruo pri vakaj postenoj.

Kompreneble ni proponas nian konsilhelpon al tiuj kiuj tion petas: komisionoj, organizoj, estraranoj, ktp. Ekzemple ni helpis pri la onta sinvendado de kreota komputikista Esperanto-asocio.

Ni certe multon ne rakontas en ĉi alineoj: pri marka unuecigo, retstrategia plano, informfluo, kreado de dokumentado, historikreado, ekregistrado de prezentaĵoj, aŭspicioj kaj partnerecoj, esplorado al ekstera publiko, premado por la enirigo de faka talento, komisiona strukturo, valorpropono, ktp. Estas tro por rakonti.

Pasporta Servo

raportas Lars Sözüer, komisiito

2016

Dum la jaro 2016 aliĝis al la programista teamo ankoraŭ Meiyer Goren kaj Ana Ribeiro. Sub gvido de Baptiste Darthenay, la teamo aldonis pliajn funkciojn al la retejo, plibonigis ĝin kaj riparis cimojn. La teamo ankaŭ zorgis, ke ĉiuj novaj mesaĝoj sendataj al unu el la kelkaj retroŝtadreso de Pasporta Servo estu traktataj kaj respondataj. Pretiĝis krome paĝo kun zomebla mapo por serĉi gastigantojn, sed tiu ĝis nun ankoraŭ ne fariĝis publika, ĉar necesas unue zorgi, ke ĝi prezentu nur tiujn datumojn, kiuj estu alirebla laŭ la ensaluta stato de uzanto.

Cetere la estraro kaj la komisiito ellaboris komune detalan planon pri la eldonado de la adreslibro, kiu laŭ tiu plano aperu en februaro 2017. La plano inkluzivas ankaŭ fincan strategion: la gastigantoj ne plu ricevos ĉiuj aŭtomate senpage la adreslibron, ĉar pro la ekzisto de la retejo ne ĉiuj nepre bezonas ĝin; ne-gastigantoj povos aĉeti la libron je ĝia normala prezo; gastigantoj ĝenerale aĉetu la libron je tre favoraj kondiĉoj (egale proksimume al niaj preskostoj+sendokostoj); nur laŭ peto ili povu mendi ĝin kontraŭ nur sendokostoj; kaj tute escepte ni sendos la libron laŭ peto senpage al tiuj gastigantoj, kiuj nepre bezonas la libron sed tute ne povas pagi.

Scienca kaj faka agado

raportas Ariadna García Gutiérrez, respondeca estrarano ĝis septembro 2016

Fine de 2015 dum JES Vit Guglielmo el Ĉeĥio, la tiama komisiito organizis prelegsesion dum JES 2015 kaj post tio mi interŝanĝis kun Anthony Lucas, membro de Internacia Scienca Asocio Esperanta (ISAE) por kunlaboro inter tiu scienca asocio kaj TEJO, pro la graveco de la scienca agadkampo en nia movado kaj ĉi kaze, pli precize, instige al junularo.

Mi ricevis retmesaĝon de junulo Jonas Sauer kiu jam de antaŭ unu jaro interesiĝas pri publikigo de sciencaj artikoloj pri matematiko kiujn li verkis. Li celas traduki ilin al Esperanto, nun kiam jam la originaloj pretas. Aldona ĝojiga novaĵo rilate al la temo, estis la malfermo de science rubriko en la revuo Kontakto.

Ekde junio 2016 la Komisiono havis novan komisiiton. Temas pri Ana Ribeiro el Brazilo. Dum la IJK 2016 en Vroclavo ŝi helpis okazigi prelegsesion. Nun la posteno por komisiito denove estas vaka, ĉar Ana estis demisiita.

Mi ricevis intereson de “Verdaj Skoltoj” por iĝi Faka Sekcio de TEJO, pri kio ni daŭre interŝanĝas.

raportas la respondeca estrarano Enric Baltasar dum la lastaj du monatoj de la jaro

Mi ekrespondecis pri SFA ĉar apenaŭ io moviĝis pri ĝi kaj mia jama laboro estas iom en rilato kun ĝi, do mi ne intencas esti la plej bona estrarano pri SFA, sed fari kontribuon al ĝi.

La maniero ekscii pri la fakaj sekcioj estas malalloga: nek en la ĝusta loko nek estas bona maniero sciigi kaj varbi uzantojn. Mi kreis la paĝon “Interesgrupoj” kaj tie aldonis la du FS-ojn kiujn ni havas. Mi sendis mesaĝon al respondeculoj kun ideoj pri plibonigoj kaj mia sinpropono helpi, sed oni neniam respondis.

Ana Ribeiro helpis min varbi la komisionan retoŝtliston, verkis raporton pri SFA dum IJK kaj, lige al Landa Agado, ni kunsidis pri la procezo iĝi sekcio de TEJO kaj la profitoj.

Rilate al KODEJO mi kreis formularon por fakaj organizoj, malsama al tiu de Landa Agado en siaj du variantoj.

Kubof nome de TEJO partoprenis KAEST, kiun ni aŭspiciis, kaj verkis raporton pri lia agado dum ĝi, eĉ kun proponoj por la estonteco.

Estis provo danke al Kubof trovi komisiiton, sed la afero ne konkludiĝis.

Oficisto

raportas Mounir Abjiou, oficisto

De la eko de 2016, post du monatoj de eklaboro kun TEJO, mi jam al kutimiĝis al mia oficista laboro kaj tiam mia prioritato estis ĉefe EVS, mi devis esplori detale pri ĝi, kiel interalie uzi Mobility Tool. Unue, mi traktis la alvenon de KuboF kaj Jérémie, kiu cetere devis trovi urĝe novan francan sendan organizon, due, la subvencipeton por nia nuna volontulino Ana por la projekto ekinta postsomere, kiu estis sukcesa, kaj trie la foriro de Paŭlo kaj lia fina raporto de la raporto kies finpagon ni ricevis. EVS-rilate, poste, en aprilo, mi denove subvencipetis por plia projekto kiu estis akceptita por Alessandro, kaj fine oktobre unu plian mi subvencipetis kiu ebligis subvencii la du francajn volontulinojn, Fériel kaj Roxane, kiuj ekvolontulos kun ni je la fino de januaro 2017. Paralele, mi traktis administraĵojn rilate al EVS kun la rilataj sendaj organizoj kaj tra Mobility Tool.

Ni ricevis pozitivan respondon pri la administra subvencio de EACEA por la jaro 2016, marte, ankaŭ tiam post kelkaj semajnoj, mi raportis gravan raporton pri la antaŭa 2015-a administra subvencio kies dungadsituacion estis komplika kaj fine ni ricevis la finpagon sed nuligante min kiel valida oficisto por la subvencio. Somere, post grava kunsido kun la Estraro kaj EACEA, klariĝis pliaj kriterioj rilate al la dungadformoj por la oficistoj kies labora situacio estas raportata nun al EACEA. Novembre, mi subvencipetis por la 2017-a administra subvencio, la

saman pasintjaran sumon kiu egalas al unu plentempa oficista posteno kaj duono kaj aldone al kvar estrarkunsidoj, ni daŭre atendas la rezulton rilate al tio.

Paralele, mi provis subvencipeton tra la Eŭropa Junulara Fonduso kaj alian subvencipeton de DEAR Call al EuropAid kiun WOSM pretigis kun TEJO, UEA kaj aliaj organizoj sed sensukcese. Post la fino de la projekto ETEY, mi ankaŭ raportis la projekton kaj plenigis ĉiujn necesajn informojn en Mobility Tool post kolekti la datumojn kaj la necesajn dokumentojn pri la projekto el diversaj homoj, kies pritakson ni daŭre atendas. Dum tiu periodo, mi akceptis kunordigon de ECY, administrflanke pri kies administraĵoj mi daŭre korespondas. Diversaj taskoj miaj estis administraj, rilate al peto, ĝisdatigo kaj alŝuto de nepraj dokumentoj al la portalo ECAS, trakti petojn el EACEA, ties kunordigo, kontaktado kun la Nacia Agentejo kaj EACEA pri diversaj projektoj de TEJO kaj aldone ceteraj paralelaj oficistaj komunikad- kaj kunordigtaskoj.

raportas Uriel Gurián, oficisto

Komence de januaro 2016 mi eklaboris kun TEJO kiel oficisto. Tuj mi ricevis taskojn kaj samtempe helpon de la stabo de TEJO. Dum la laboro mi pli kaj pli alkiutimiĝis al la posteno kaj al la labormaniero de la organizo.

Miaj unuaj taskoj estis kompari informojn pri TEJO ĉe la retejo de UEA kaj ĝisdatigi informojn pri komitatanoj kaj komisionoj. Mi ricevis la taskon labori kun la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, kie la laboro estas tre diversa. Mi kontribuis al demandaro pri Agendo de kapabloj de Eŭropa Unio, mi helpis ĉe redaktado de tri-monata raporto de la labor-forto de IKRJO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj) kie TEJO membras, kaj regule mi verkas resumon de ĉiumerkreda novaĵaro de FoJE (Forumo Junulara Eŭropa).

Krom tio, mi ankaŭ helpas la estraron diversmaniere, mi enmetas ĉiun monatan cirkuleron en la retpaĝo de TEJO, aktualigas informojn pri komisiitoj kaj tradukas malfermajn alvokojn kiam necesas.

Post la sukcesa subvencio de Eŭropa-Afrika projekto mi preparis mandatilojn kaj kunordigis kun ĉiuj partneraj organizoj la sukcesa plenigo kaj subskribado de ili, por Kongolando mi ankaŭ devis prepari dokumentojn pri ŝanĝo de laŭleĝaj reprezentantoj kaj same zorgi pri la ĝusta plenigo kaj subskribado.

En marto mi komencis prepari trejnad-skaton kadre de la projekto ETEY (Trejnado de trejnistoj) kaj kontaktis trejnistojn por kolekti materialojn kaj ordigi ilin, post la sesio de IJK ĉiujn materialojn disponeblas rete.

La plej granda tasko por mi tamen estis la verkado de projekto pri kunlaboro inter Eŭropo kaj Ameriko nome Kapablo-konstruado en la kampo de junularo kadre de Erasmus+. Ĝi certe estis la plej defia por mi, mi devis kontakti eblajn partnerajn organizojn kaj klopodi konvinki ilin partopreni la projekton. Mi gvidis la latinamerikajn partnerojn ekde la registriĝo ĉe la Portalo de partoprenantoj kaj kunordigis kun ili la diversajn ontajn agadojn de la projekto. Post preparo de buĝeto, detala priskribo kaj formularo, la projekton mi sendis fine de junio.

Nun, post 6 monatoj da laboro mi sentas multe pli komforta en la posteno kaj klopodos uzi ĉiujn miajn kapablojn kaj novajn spertojn por helpi atingi la celojn de TEJO.

Volontuloj

La TEJO-volontulo okupiĝas pri la ĉiutaga oficeja administrado kaj pri la kontaktoj ene kaj ekstere de la organizo. Tio inkluzivas la pritraktadon de la poŝto, papera kaj reta, telefonon, Skajpo, ktp kaj la respondadon al la demandoj kaj petoj de la membroj, aktivuloj aŭ eksteruloj. La volontulo respondecas ankaŭ pri la komunikoj pere de la Facebook- kaj Twitter-kontoj de TEJO, kaj parte pri la publikigado de la novaĵoj en tejo.org. Krome, li/ŝi ofte kunordigas la laboron de estraranoj, komisiitoj kaj aliaj aktivuloj, plifaciligante la komunikadon inter ili, memorigante taskojn kaj limdatojn, kaj ankaŭ estante la ĉefa kontaktpunkto kun la CO en Roterdamo. Dum la fizikaj kaj retaj kunsidoj ŝi/li verkas la protokolojn kaj la taskolistojn. Koncerne la rilatojn inter la landaj sekcioj kaj TEJO, la volontuloj partoprenas en la kolektado de informoj por la enketo KODEJO. La respondoj al tiu ĉi enketo estas uzataj por ĝisdatigi la informojn pri TEJO kaj ĝiaj LS-oj aperantaj en la Jarlibro de UEA. La volontulo partoprenas en la vivo de la Centra Oficejo de UEA kaj de tempo al tempo helpas pri komunaj taskoj. Ekzemple la volontulo regule voĉlegas artikolojn de la revuo Esperanto por dissendo al blinduloj.

raportas Jeremie Bert

La volontulo Paweł Fischer-Kotowski (Pollando) estis anstataŭita de Jeremie (Francio) fine de decembro 2015. La oficisto Mounir Abijou prizorgis la transdonon de spertoj dum la komenco de 2016, sed ankaŭ per reta komunikado dum la sekva periodo.

Nome de TEJO en 2016 mi ĉeestis en evento de la Forumo de Junularo Eŭropa, helpis pri logistiko, reprezentado kaj materialoj (komputiloj, varbiloj k.a. varoj) dum la EJO en Straburgo. Kiel volontulo mi reprezentis la organizon ankaŭ ene de la movado, okaze de diversaj aranĝoj. Mi aranĝis la TEJO-standon por doni informojn al la partoprenantoj kaj kolekti aliĝojn kaj abonojn. Ankaŭ daŭris la TEJO-varbkampanjo “TEJO protektas vin”, kun disdono de kondomoj. Mi ankaŭ partoprenis la prelegon pri Trello. En septembro la posteno de la volontulo estis transdonita al Alessandro Bonfanti kaj Ana Stretcu. Okazis multaj burokrataĵoj rilate al subvencianto EACEA kaj multaj ŝanĝoj pri aldonaj stabanoj kaj ŝanĝo de estraranoj kaj komitatanoj. Ni devis publikigi plurajn alvokojn kaj trakti la kandidatiĝojn. Post tio, kiam UEA aĉetis novan Volontulan Domon en Roterdamo, mi translokiĝis multajn aĵojn de la CO tien. Mi partoprenis semajnfine aranĝoj de NEJ kaj Duolingo en la Haga Eo-Instituto.

Mi trovis dum mia tempo kiel volontulo ekzakte tion, kion mi serĉis: plentempan laboron por Esperanto. Mi devis multe kunlabori kun granda oficista stabo (7 oficistoj fine de 2016 kaj 4 volontuloj, plus tiuj portempaj aŭ ne de la CO-UEA kaj aliaj subgrundaj aranĝoj/kundividoj). Mi rezistis multe dum la transira periodo de la Ĝenerala direktoro kaj la malsaniĝo de la direktoro. Mi partoprenis la Ĝeneralan voĉdonon kiel membro kaj kiel volontulo. La kelkaj laŭdoj, kiujn mi ricevis, ankaŭ kuraĝigis min. Mi ankaŭ havis multe por fari kaj devis bone organiziĝi. Kiam mi havis grandan taskon farendan – ekzemple redakti protokolon aŭ korekti artikolojn de niaj kanaloj – mi ne devis neglekti la pli etajn taskojn (ekzemple respondi al la retmesaĝoj), kaj inverse, tiuj etaj taskoj ne povis ĝeni plenigadon de la pli grandaj. Mi pro tio multe lernis, kaj ankaŭ multe spertiĝis pri la laboro en organizo, laboro en teamo.

raportas Michal “KuboF” Matúšov

Al la teamo de TEJO-volontuloj mi aliĝis en duono de januaro 2016. Tiutempe jam volontulis Jeremie Bert de Francio; la antaŭa volontulo, Paweł Fisher-Kotowski de Pollando, plue laboris en la CO kiel portempa oficisto de UEA

kaj disponeblis por konsultado. Proksime al fino de mia volontulado la teamon aliĝis novaj volontuloj Alessandro Bonfanti de Italio kaj Ana Stretcu de Rumanio.

Al miaj taskoj apartenis mikso de kutimaj TEJO-volontulaj taskoj (ekz. traktado de retroŝto, sociaj retejoj, verkado de raporto de kunsidoj, zorgado pri la CO ktp.) kaj taskoj pli kongruaj kun miaj intereso (teĥnikaj laboroj, helpado al la *Muzika konkurso de Kontakto* ktp). Aldone, kiel EVS-volontulo mi povis starigi kaj gvidi proprajn projektojn - mi elektis projektojn rilatajn al Vikimedia movado kaj konsekvence mi estis nomita “Rezidanta Vikimediano”, ŝajne la unua en Esperanta organizo.

Nome de TEJO mi partoprenis diversajn renkontiĝojn, plej notinde la Eŭropan Junularan Okazaĵon en Strasburgo, Francio, IJK-n en Vroclavo, Pollando, ILEI-Konferencon en Nyíregyháza, Hungario kaj KAEST-n en Modra-Harmónia, Slovakio. Krome, mi partoprenis 2 devigajn EVS-renkontiĝojn kun aliaj EVS-volontuloj volontulantaj en Nederlando kaj 2 TEJO-estrarkunsidojn (la duan organizante la lokan logistikon).

Mia volontulado estis tre malfacila kaj dum plejparto de la tempo mi volis forlasi ĝin. Tamen, fine ni trovis uzeblan aranĝon kaj mi kelkfoje portempe laboris de ekster Roterdamo.

EVS estas programo de neformala edukado. Malgraŭ mia manko de intenco lerni per EVS, mi lernis multajn aferojn, precipe rilate al administra laboro, funkciado de internacia organizo, gvidado kaj kunordigado, teama vivado, politikumado, funkciado de Eŭropa Unio, diversaj kulturoj sed ankaŭ multege pri ege grava temo de homa psiko, kio estas unu el plej valoraj lernitaĵoj de mia EVS.

La volontuladon mi forlasos en duono de Januaro 2017, kiam mi trasiros al oficistado en TEJO, pri kio mi tre ĝojas, ĉar mi estos multe pli libera en organizado de mia laboradmaniero kaj tiel mi povos adapti ĝin por labori pli efike kaj pli ĝoje.

raportas Ana Stretcu

Mi komencis volontuli en septembro 2016, aliĝinte al la Volontula teamo de TEJO en la Centra Oficejo en Roterdamo. La Volontula teamo tiam havis 3 aliajn volontulojn: Jeremie Bert (Francio), Michal KuboF Matúšov (Slovakio) kaj Alessandro Bonfanti (Italio), kiuj prizorgis la transdonon de spertoj dum la unua semajno kaj ankaŭ poste dum ilia kunlaboro.

Mi partoprenas en la vivo de la Centra Oficejo de UEA kaj de tempo al tempo helpas pri komunaj taskoj. Tial, mi zorgis pri aĉetado de aferoj por la nova volontula domo, kiu estis tute malplena kiam ĝi estis aĉetita. Krome tie mi partoprenis la purigadon, ordigadon, sed ankaŭ butikumadon por la nova loĝejo de volontuloj. Kaj tiu laboro ankoraŭ daŭras. La agadoj ene de la CO inkluzivas ankaŭ la partoprenon en la Malferma Tago de UEA, kaj la reprezentadon de TEJO tie. Mi kunzorgas pri Duolingo-dissendaĵoj, kio signifas ke ni sendas ĉisemajne 2 esperantistajn revuojn kaj gratulleteron al homoj kiuj finas la Duolingo-kurson kaj sendas iliajn detalojn al la taŭga Landa Sekcio se homoj volas tion. Mi kiel EVS-volontulo devas partopreni 2 EVS-trejnadojn dum mia volontulado, mi jam partoprenis la alvenan trejnadon en novembro 2016 en Arnĥemo.

En oktobro 2016, mi kaj Alessandro Bonfanti partoprenis KKPS-n nome de TEJO kaj gvidis la kunsidon kun parteneraj esperantistaj organizoj pri eŭropa projekto pri alekstera komunikado. Mi ankaŭ estis nomumita kiel TEJO-KER volontulo kaj tial mi pli multe zorgis KER-rilataj aferoj, ekzemple verki kontaktleterojn al aliaj organizoj kun kiuj TEJO povus kunlabori, revizii la laborplanon de la Forumo Junulara Eŭropa, sendi ĉisemajnan resumon de la FoJE-novaĵletero al la KER-listo kaj partopreni KER-rilatajn (ret)kunsidojn. Kiel TEJO-KER prioritata volontulo mi iĝis la kunordinganto de la EJO 2017, FoJE-evento kiu okazos en Mastroĥto, do mi partoprenis FoJE-ekkunsidon pri tio kaj poste mi zorgis pri ordigado de rilataj aferoj ene de TEJO (agadoj, teamo, vojaĝo ktp) kun helpo de la prezidanto Michael Boris Mandriola, Costanza Schöpfung kiu kunordigis la eventon en 2016 kaj la volontulo Alessandro Bonfanti.

Dum miaj 3 monatoj kiel volontulino mi lernis multe pri la E-movado, pri kiel kunlabori kun aliaj en la TEJO-eamo, labori en organizo, sed mi ankaŭ lernis Esperanton, kiu mi preskaŭ tute ne scipovis en la komenco de mia volontulado.

raportas Alessandro Bonfanti

Mi, Alessandro Bonfanti (Italio), ekis en mia posteno dum septembro 2016, La volontula teamo tiam enhavis du aliajn volontulojn: Jérémie Bert (Francujo), kaj Michal KuboF Matúšov (Slovakujo). Tuj poste aldoniĝis al la teamo ankaŭ Ana Stretcu (Romanujo).

La oficejaj volontuloj okupiĝas pri multaj malsamaj taskoj, kiuj inkluzivas la

ĉiutagan oficejan administradon; la partoprenon al la estraraj kunsidoj (rete aŭ fizike), la komunan bontenadon de la Centra Oficejo kaj, ekde la fino de la jaro, ankaŭ de la meblado por la nova Volontula Domo, aĉetita por loĝigi novajn volontulojn en pli agrabla kaj maloficejan etoson.

Krom tiuj ĝeneralaj komunaj taskoj, mi komencis okupiĝi ankaŭ en pli person-rilataj aferoj. Post la enkonduka periodeto mi komencis prizorgi la muntadon de la voĉlega versio por blinduloj de revuoj de UEA kaj TEJO. Ĉar mi estas komputilisto, mi ofte prizorgis tehnik-rilatajn taskojn kaj tasketojn, kiuj alvenas pli-malpli ĉiam. Tiu inkluzivas la helpon en la bontenado kaj ĝisdatigo de tejo.org kaj esperanto.net. Mi ankaŭ helpetis mian kunvolontuladanton Ana en la necesaj aranĝoj por la partoprenado de TEJO al YO!Fest, kiu okazos Februare en Matriĥto (Nederlando).

Mi partoprenis kiel TEJO-volontulo du Esperantajn renkontiĝojn, dum oktobro al KKPS-n en Delft (Nederlando) kun Ana kaj dum la jarŝanĝo JES-n en Waldheim am Brahmsee (Germanio). Mi ankaŭ partoprenis la tradician Malferman Tagon de la Centra Oficejo, kie mi okupiĝis pri la bonvenado de la gastoj kaj de la filmado de la konferencoj. Fine mi partoprenis kiel ĉiuj EVS-volontuloj al la alvena EVS-trejnado en Arnĥemo (Nederlando), kie mi havis okazon ekkoni multajn aliajn homojn, kiuj volontulas por aliaj interesaj organizoj en Nederlando el malsamaj partoj de Eŭropo.

Dum miaj unuaj tri monatoj kiel volontulo mi lernis pri la funkciado kaj strukturiĝo de TEJO; pri la komuna teama laboro en kaj ekster la Centra Oficejo; pri la plenigado de la plej malsamaj taskoj. Per neformala edukado kaj komuna vivo kaj laboro en ekstera lando mi kreskis, spertiĝis kaj pliboniĝis iomete mian Esperanton kaj mi esperas la samon por la venonta jaro.

Mallongigoj

AC	Advisory Council <i>(KonsilKonsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo)</i>
AEGEE	Association des Etats Généraux des Etudiants de l'Europe <i>(Eŭropa Studenta Forumo)</i>
AEJK	Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo
AKE	Afrika Kongreso de Esperanto
AL	Araba Ligo
AT	Aktivula Trejnado
BEST	Board of European Students of Technology <i>(Eŭropa Konsilio de Teknologiaj Studentoj)</i>
CO	Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo)
COP22	Klimatkonferenco de la Unuiĝintaj Nacioj de 2016
DEAR	Development Education and Awareness Raising
EACEA	Education, Audiovisual and Culture Executive Agency <i>(Eduka, Aŭdvida kaj Kultura Plenuma Agentejo)</i> de EU
ECAS	Eŭropa CivitanAgada Servo
ECY	Effective Communication for Youth <i>(Efika komunikado)</i>
EJF	Eŭropa Junulara Fonduso
EJO	Eŭropa Junulara Okazaĵo
EKOSOK	EKOnomia kaj SOcia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj
EPLM	European Platform for Learning Mobility
ETRY	Empower Trainers, Empower Youth <i>(Trejnado por trejnistoj)</i>

EU	Eŭropa Unio
EVS	Eŭropa Volontula Servo
FEJ	Filipina Esperanto-Junularo
FLOM	Fortoj-Lamaĵoj-Oportunoj-Minacoj
FoJE	Forumo Junulara Eŭropa
FTP	File Transfer Protocol (<i>DosierTransdona Protokolo</i>)
IJF	Internacia Junulara Festivalo
IJK	Internacia Junulara Kongreso
IKRJO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj
ILEI	Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj
ISAE	Internacia Scienca Asocio Esperanta
JES	Junulara Esperanto-Semajno
JOTE	Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj
KAEST	Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko
KdE	Konsilio de Eŭropo
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
KKPS	KlaĉKunveno PostSomera
KODEJO	KOMpleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj
LA	Landa Asocio
LKK	Landa Kongresa Komitato
NA	Nacia Agentejo
NROj	NeRegistaraj Organizoj
SFA	Scienca kaj Faka Agado

TA	TEJO Aktuale
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT	TEJO Tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso
<i>UNITED</i>	Unuiĝintaj por Interkultura Agado
WOSM	World Organization of the Scout Movement (<i>Monda Organizo de la Skolta Movado</i>)

Suplemento 1

Saluton karaj:

Pere de tiu ĉi letero mi informas vin pri mia demisio al la estraro de TEJO kie ĝis nun mi oficis kiel estrarano pri Landa, Regiona, Scienca kaj Faka Agado. Mia eliro de la estraro ne signifas ke mi ne plu aktivos aŭ agados en la esperanto-movado aŭ enlande aŭ je internacia nivelo, eĉ male.

La aldonaĵoj al la jarraporto, postulitaj de la komitato en la pasinta komitatkunsido de la Internacia Junulara Kongreso okazinta en Vroclavo, mi finpretigas kaj liveros ĝin al la estraro kaj al la komitato kiel eble plej baldaŭ.

Mi restas je via dispono kaj pretas daŭre kunlabori ekster tiu ĉi kadro.

Ariadna García Gutiérrez

Havano, 11-08-2016

Suplemento 2

Saluton estimataj,

Mi oficiale anoncas mian tujan demision al la posteno "Oficisto de TEJO".

La decidon mi prenis ĉar pro personaj kialoj, mi sentas ke mi ne plu povos efike kontribui al la agado de TEJO.

Mi dankas al vi ĉiuj pro via helpemo dum nia laborrilato kaj deziras fruktodonan laboron!

Kaze de ajna demando, ne hezitu skribi min private.

Plej amike,

Uriel Gurdíán

15-10-2016